

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

500 n-roj da Organoj, 50 jaroj de la Praorganizo — “Organo pelas, Organo peras” —

Sibayama Zyun'iti, la prezidanto

Paralele al la eldono de tiu ĉi 328-a n-ro de “Novaĵoj Tamtamas”, nia esperantlingva organo, aperas la 500-a n-ro de “La Tamtamo”, nia ĉeforgano (tamen plejmulte en la japana ekde la disigo de tiu ĉi esperantlingva organo en 1989).

Estis antaŭ duonjarcento, novembro de 1967, tiamaj esperantistoj en Jokohamo celis fondi organon nomotan Jokohama Esperanto-Rondo (karesnome Hama-Rondo), unue eldonis bultenon, kaj tio estas la fonto de nia aktivado

per organoj.

Nu, mi devizu: “Organo pelas, organo peras”. Nome organo pelas nin antaŭen, ofte ripozeman, al la pionira movado Esperanta kun kuraĝigo, kaj ankaŭ peras nin, samideanojn al la rondo de kunlaboro.

La formo de organo povas evoluigi, kaj eventuale ni jam ne havos paperforman organon, sed tia devizo pri la funkcio de la organoj plu daŭros, mi opinias.

Ĵus aperis infanliteraturaĵo japana, tradukita de nia membro

En julio eldonita estas **“La nanoj en domo kun granda zelkovo”**, verkita de Inui Tomiko kaj tradukita de Itabaŝi Micuko, nia membro, kiel A5-formata 208-paĝa libro, kun multaj ilustraĵoj kaj klarigoj pri japanaj aĵoj. La prezo estas 1200 enoj plus akcizo enlande, aŭ 9 eŭroj ekster Japanio. Eldonis ĝin Japana Esperanto-Instituto. Pri la libro, bv. legi jenan klarigon.

Vivis kvar nanoj: geedzoj, iliaj filino Iriŝa kaj filo Robin en angulo de iu domo kun granda zelkovo. Ili estis prizorgataj en tiu domo. Nome infanoj de la familio de la domposedanto komisiite unu post alia portis lakton en la glaso ĉiumatene al la nanoj.

Juri, la plej juna malsanema infano transprenis tiun taskon. Liveri lakton al la nanoj fariĝis pli kaj pli malfacile, ĉar Japanio



envolvis sin en senfinan militon.

Irisa kaj Robin vivis enfermite en subtegmenta angulo de la domo, sed komencis senti malfacilan cirkonstancon kaj volis scii la eksteran mondon.

Robin amikiĝis kun la kolombo Jahej, kiu komunikis al li situacion en Tokio. Juri devis

evakuiĝi sola kun la nanoj al fora nordo apud la lago Noĵiri ĉe sia parenco.

Komenciĝis malfacila vivo de Juri, kiu baraktis akiri lakton por la nanoj.

Majstroverko en la japana literaturo por geknaboj.

La 107a Legokunsido

En la 3a de junio, ni havis la 107an legokunsidon por “Serpentoj en la putro” de István Nemere. Partoprenis ses personoj.

Teruro kaj aventuro (Serpentoj en la putro)

Mizro Iwaya

Rakonto de Nemere estas ĉiam ekscita. Okazas granda sensacio kaj enscenaj personoj baraktas sekvi ĝin. Same ankaŭ ĉi tie. La sensacio estas amasteroro en eŭropa urbo fare de fanatikaj islamanoj. La titolo venas de la legendo en orienta vilaĝo: Oni kredis ke oni forpelis abomenindajn serpentojn en puton, tial la vilaĝo estas sekura, sed ili sekrete eskapis el la putro kaj ekatakas la vilaĝon (P.68). Certe la serpentoj signifas teroristojn.

La scenejo dividiĝas ĉefe en kvar lokojn. La unua estas la urbo kie okazas murdoj kaj teroroj. Ĝi ricevas grandan damaĝon pro la krimo. La dua estas Verda Fortikaĵo kie kolektiĝas policanoj kiuj batalas kontraŭ ne videblaj teroristoj. Ĝi montras la malfacilecon de la batalo. La tria estas televidejo aŭ simila amaskomunikejo kie oni elsendas polemikon pri teroro. Ĝi montras ĝeneralan tendencon kaj reagon de urbanoj. La kvara estas tapiŝ-vendejo kie kolektiĝas suspektinduloj. Ĝi provas reliefigi la motivon kaj aktualan konduton de la krimuloj.

Tiamaniere tiu ĉi verko enhavas analizon kaj exploreman tezon. Certe eŭropanoj, inkluzive de la aŭtoro mem, havas grandan dubon pri islamaj teroroj en Eŭropo. Do ili deziras solvi la enigmon kaj verkas novelon post

pena esploro. Unu el la rezultoj estas tiu ĉi libro. Ĉu trafas aŭ maltrafe?

Aparte de la teoria aŭ ideologia fono, tiu ĉi historio estas aventura kaj ekscita precipe en la dua duono. Oni povas sufiĉe ĝui la legadon.

Eĉ nun, multe pli aktuala – Serpentoj en la putro

Sibayama Zyun’iti

Tiu ĉi verko pri terorisma atako aperis en 2009, kiam ankoraŭ Bin Ladin fuĝadis post la novjorka kataklismo je 2011-09-11, kaj en ĝi, fone de la atakoj en iu eŭropa Urbo menciitaj estas atakoj en Londono. Ĉi-jare ĝuste en Londono okazis veraj atakoj, eĉ plurfojaj, do des pli aktuala estas la temo de tiu ĉi verko, nome atako al la “mola celo” – al la civiluloj en civilaj lokoj. En ĉi tiu libro mortas pro bombo multaj personoj tute senkulpaĵ. Nu, en ĉi tiu libro oni aludas, ke multegaj personoj tute senkulpaĵ mortas en landoj for de Eŭropo, sed tio ne estas centro de la temo.

Kiel fikcio de la verkisto Istvan Nemere, en la libro aperas diversaj lokoj alterne. Ja iuj arabaj landoj aperas en la komenca ĉapitro, kaj mi atendis priskribon de la arabaj landoj, kie suferas multaj personoj, kaj ke eble la rezonado kial atenci eŭropajn civilulojn aperos, sed bedaŭrinde la arabaj scenoj malaperas de la dua granda ĉapitro, kaj sekvas scenoj



diversaj, sed nur en iu Urbo.

En Urbo, kvazaŭ katekismo, bonaj civitanoj defendas eŭropan superecon kontraŭ islamisma tendenco, kaj iuj islamismoj — aŭ mis-islamismoj (ĉar vera islamismo ŝajnas esti paca religio) — defendas sian kialon missuperi eŭropan sociordon.

Inter tiuj katekismoj fluas la rakonto: aperas justec-gardaj policianoj, neŭtralaj civitanoj, intrigemaj (mis-)islamanoj; iuj spionas, aliaj konvertas, iuj ĉasas, aliaj mortas senkiale en ega fortostreĉiteco. Mi rekomendas, ke oni faru bonan filmon el la rakonto.

Sed tamen, kial la ĉefmalbonulo faras malbonon mortigi homojn? Ĉu nur pro sia religia kredo? Mi ŝatus aŭdi kian malhelan koron havas la terorista fanatikulo. Sen ĝi, la rakonto

estas kvazaŭ la usonaj rakontoj “Western”, t.e. “Okcident-Usonaĵoj”, kie blankulo ĉiam justas.

La arkifripono mortigas sia-tendencanojn kaĵolante, kaj per tiu bomb-mortigo influigas ĉirkaŭajn bonajn civitanojn. Oni vidas, ke kvazaŭ okazis “banzai”-atako, t.e. “memvola sturmado kun hurakriado por ataki senkulpaĵajn civilulojn”. Sed la artifiko de la fripono estas, ke simpla sia-tendencano ne sciante la sencon de ago mortigas bonajn civitanojn. Kio en la daŭro de legado multe streĉigas, kaj eĉ supozigas, ke okazas samaĵoj en la realo. Nome, junula religiemulo NE per sia volo atakas, sed artifikite atakas dum en la fono estas iu malantaŭ kuliso. Kaj priskribo de la psiko de tiu malantaŭ la kuliso mankas. Tio estas la plej grava manko de tiu ĉi rakonto, mi opinias.

Eseo

La kaŝita fakto pri la knabino portanta ruĝajn ŝuojn

AIDA Kiyoshi



En la parko de Jamaŝita troviĝas la statuo de la knabino sidanta sur ronda bazo. La infana kanto “Ruĝaj ŝuoj” estas tre populara inter japanoj. La kanto-teksto estis versita de Noguĉi Uĵoo (1882~1945) kaj komponita de Motoori Nagajo (1885~1945) en aŭgusto 1922.

La unua verso tradukita esperanten de Macuba Kikunobu, kiu loĝis en Jokosuka, estas jene:

Ruĝajn ŝuojn ŝi portis l’ etulin’
Min impresis ŝi, sed en akompan’
Fremdula iris for de mi

Laŭvorta traduko de AIDA Kiyoshi estas jene:

La knabino portanta ruĝajn ŝuojn
Foriris akompanate de fremdulo

Reale la knabino ne iris al eksterlando akompanate de fremdulo, sed ŝi mortis suferante de tuberkulozo en orfejo en Tokio je la aĝo de 9 jaroj. Ŝi nun kuŝas en la tombo apartenanta al la eklezio Toriizaka en la tombejo Aojama.

Ŝi naskiĝis kiel bastardo en la urbo Ŝizuoka en la 15-a de julio 1902. Ŝi nomiĝis Iŭasaki Kimi. En 1905 ŝia patrino iris al la urbo Hakodate kun sia knabino kaj laboris en agrikultura kampo. Tie ŝi edziniĝis al s-ro Suzuki Ŝiroo kaj ili pene laboris en la kampo. Pro tiu severa vivo la knabino Kimi estis adoptita de ges-roj Charles Huette, kiam ŝi estis tri-jara. S-ro Huette estis metodisma pastro.

En 1908 ges-roj Huette devis reveni al Usono. Kvankam ili volis akompani Kimi, tiam la knabino suferis pro grava malsano, t.e. tuberkulozo. Ges-roj Huette konfidis ŝin al la orfejo apartenanta al la eklezio Toriizaka en Azabu, Tokio.

En 1911 Kimi mortis en la aĝo de 9 jaroj. La gepatroj translokiĝis al la urbo Sapporo

pro malsukceso en sia vivo kiel kamparanoj. S-ro Suzuki eklaboris en la malgranda ĵurnala eldonejo nomata “Hokumei Ŝinpoo” kaj ekkonis s-ron Noguĉi Uĵoo en la sama laborejo. S-ro Suzuki parolis al Uĵoo pri sia bofilino Kimi adoptita al fremduloj. Aŭdinte pri la knabino la poeto Uĵoo versis la kanto-tekston “Knabino portanta ruĝajn ŝuojn” en 1921 kaj la komponisto Motoori Nagajo komponis la kanton en 1922.

Dume la patrino de Kimi ne sciis la fakton pri la morto de sia filino: ŝi ne dubis, ke la filino vivas feliĉe en Usono kun ges-roj Huette. Poste

sciinte, ke la filino jam mortis en la orfejo, ŝi kutimis kanti la kanton de “la Knabino portanta ruĝajn ŝuojn” rememorante sian malfeliĉan filinon.

En 1973 s-ino Oka Sono kontribuis artikolon al la Ĵurnalo Hokkaido, ke la knabino en la infankanto, kiun Noguĉi Uĵoo versis, estis ŝia plej aĝa duonfratino. Surbaze de la informo s-ro Kikuĉi Hiroŝi laboranta por TV Hokkaido eltrovis la ekziston de la vera modelo post kvin jaroj da esplorado.

Tiel Okazis

Tiel ni preparas la Japanan Kongreson (1) – speciala Hama-Ronda Vespero

*jun. 17, 17:00-20:00 en la kutima kunvenejo
La 104-a Japana Esperanto-Kongreso okazos ĉe ni, kaj ĝis nun ĉefe estraranoj de nia rondo, kune kun Japana Esperanto-Instituto, laboris en la Konstanta Kongresa Komitato (KKK) por la preparo. En tiu ĉi tago okazis t.n. HamaKK, t.e. Jokohama Kongresa Komitato, malferma al ĉiuj membroj. Partoprenis 17 anoj, kaj post la klarigo pri la ĝenerala stato de la preparo, oni parolis kiel oni dividu laboron, ktp.
Tia ĉi kunsido denove okazos en la 15a de julio.

Niaj Planoj

Movada Foiro en la Seula UK (22a de julio)

Okaze de la Movada Foiro, montrejo de diversaj organizoj ĉe la 102-a Universala Kongreso en Seulo, Koreio, nia rondo havos tablon, kaj reklamos i.a. pri nia Japana Kongreso.

Ekspozicio pri Esperanto, kun “la lernolibroj de sia nacia lingvo”

Dato: la 11a, 12a, 13a de septembro
Loko: en la kutima kunvenejo en Jokohamo
Tiu ekspozicio denove okazos kadre de la novembra Japana Esperanto-Kongreso.

La 104-a Japana Esperanto-Kongreso

Dato: la 3a, 4a, 5a de novembro 2017
Kongresejo: “Kanagawa Roodoo Plaza”, en la mezo de la urbo
Kongresa temo: Haveno peras, Esperanto peras
Kotizo de homoj el eksterlando: 2 000 enoj
Por aliĝo: turnu vin al Japana Esperanto-Instituto (rete: jek2017@jei.or.jp, reteje: <http://www.jei.or.jp/evento/2017/jek/>) Pri la urbo Jokohamo, turnu vin al ni, je info@esperanto.yokohama.

Niaj klasoj kaj kursoj

Okazas jenaj klasoj
(ĝenerale en Kanagaŭa Kenmin Sentaa)
*Regulaj Klasoj en sabato:
(1) Klaso “Eseoj” por legi “Tamen ĝi moviĝas!”
(2) “Jokohama Salono”: 2 fojojn monate oni legas “Mondo de travivaĵoj”, 1 fojon - libera frazfarado; kaj alian fojon - tradukado laŭ sia plaĉa fonto

*Regulaj Klasoj en merkredo:
(1) Posttagmeza klaso “eriko” por legi “La Zamenhof-Strato” gvidata de Doi Ĉieko
(2) Antaŭtagmeza klaso “Belĉielo” por legi “Punkuino”, gvidata de Doi Ĉieko
*Krome neregule du fojojn monate, la Klaso “Belflora” por legi libron “Punkuino”, gvidata de Doi Ĉieko